

La babiladaj rondoj okazos je la 19h30 vendrede

La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kun deserto). La partoprenantoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto por la manĝaĵo (...kaj por la luo de *Espace Dickens*, se necesas).

"Ambaŭa": la 3-an de junio, Francisko invitos nin ĉe Espace Dickens

Sabate, la 9-an de julio, Markus invitos nin siahejmen en Arzier.

"Okcidenta" :

La 27-an de majo

ĉe Gilbert Darbellay

ch. de l'Orme 6, Morrens

021 732 23 22 / 079 315 14 13



La 24-an de junio

ĉe Francisko en Vallombreuse.

Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd>

"Orienta" :

La 17-an de junio

ĉe Charlotte Blanc Maillard

Avenue Nestlé 7, Vevey

021 922 34 74 / 079 393 32 63



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6>

Bazaro: Bezonatas minimume 4 personoj inter la 09h30 kaj 12h30, (Palud - Lausanne) la 2an, 16an, 30an de julio kaj 13an de aŭgusto.

Por partopreni, aligu ĉe : <http://doodle.com/poll/4i9p85gmbb7y7wen>

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

www.facebook.com/societedesperanto.lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63

Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Laŭzana Esperanto-Societo

Informilo

junio 2016 - n° 06

Sabate, la 11-an de junio


Jara ekskurso

ĉe *Chaplin-World* (Ĉaplin-mondo)

Pagu vian aliĝon ĝis la 30-a de majo

(Vi trovos detalojn en la maja informilo)

Somera paŭzo



La 5-an de septembro

Decidota

La 3-an de oktobro

Decidota

Proverbo

Se muso nur unu truon disponas,
ĝi baldaŭ la vivon fordonas.



Respondo pri la enigmo (vidu pasintan informilon)

Ĉu vi rememoras pri ĝi ? La respondo estas : la magio, kiu povas esti blanka , kaj mirigi nin, aŭ nigra, kaj ensorĉi nin...

MALKUTIME BABILADA RONDO SOMERA

Dum la somero, la LES-anoj kutime ripozas, legas, kongresas ...
Sed, ĉijare, **sabate la 9-an de julio, Markus Sanz** kaj lia edzino Dragana (022 360 81 11 - 079 610 50 39) invitos nin partopreni kanadan piknikon kiel speciala *Babilada Rondo*.

Aliĝu aŭ ĉe la "orienta" aŭ ĉe la "okcidenta" DOODLE.

Ĉar parkejo estas malgranda, ni proponas iri trajne (tute aŭ parte).
Iuj povos trajne foriri el Laŭzano je la 9:48 (sFr 23.40/46.80), trajnŝanĝo en Nyon. Iuj povos trajne iri el Nyon (sFr 7.20/14.40) je la 10:22. Iuj povos trajne iri el Trelex (sFr 6.90/13.80) je la 10:30. "Cela" haltejo en La Chèvrerie je la 10:55. Eblas ankaŭ iri aŭten.



Bona konduto

Stirante sian aŭtomobilon pastro veturigas monaĥinon al ŝia monaĥinejo. La pastro ne povas retenigi sin rigardi ŝiajn belegajn krucitajn gambojn, li metas sian manon sur la kruron de la monaĥino. Ŝi rigardas lin kaj diras al li : « Mia Patro, ĉu vi rememoras pri la psalmo 129 ? » La patro reprenas sian manon kaj pardonpetegas.

Ili jen alvenas al la monaĥinejo. La monaĥino eliras el la veturilo sen diri vorton. La pastro, memriproĉanta pri sia malkonvena gesto, ĵetas sin sur la Biblion, serĉante la psalmon 129.

Psalmo 129 : « Iru for, serĉu ĉiam pli alten, vi trovos la gloron ».



Aforismo

Ĉiu volas longe vivi sed neniu volas esti maljuna.

Jonathan Swift (1667-1745)

Agrabla surprizo

Ĉu vi sciis, ke nia prezidanto estas ankaŭ poeto. De longe li kaŝis tiun belan kvaliton...



La kuzino

*Frumaten' levis min
Kaj iris al edzin'
Sed trovis la kuzin'.*

*Surprizis grande min
Salutis gaje ŝin
Ĉu vi, tie, Martin'
Anstataŭant' edzin' ?*

*Mi venis al kuzin'
Matene vidi ŝin
Ĉar la patro senfin'
Demandas pri edzin'.*

*Li estas en angor'
Ĉar havas en memor'
Ke de edzo la kor'
Tra la mond' iras for.*

*Respondis mi fervor'
Amas ŝin mi ancor'
Restas por ŝi la kor'
Ŝia estas en or'.*

*Kuzino ridis por
La respondo el kor'
Kaj de patro l'angor'
De si elpelis for.*

*Alvenis la edzin'
Kaj gaje kun kuzin'
Babilis ŝi senfin'.*

David Buhlmann
Majo 2016

